




*Ĉagrenigas min tia mondo, en kiu la plej riĉaj skribus la rulojn  
nur por tio, ke la ceteraj ilin obeu. (A. Deaton)*

## Redirekti la tendencon

Eĉ post jaroj de financaj perturboj, la Stokholmaj konsultantoj premias la ekonomistojn kiuj – per siaj studoj kaj laboro – promocias la ekonomion delonge gvidantan al generado de konstantaj krizoj. Okazas tamen, precipe en lastaj jaroj, la bonaj esceptoj. La ĉijaran Nobel-premion pri ekonomiko ricevis brito **Angus Deaton** por la "Studoj pri konsumado, malriĉeco kaj bonstato". Komenton pri tiu premio prezentas L. Bruni – profesoro specialiĝanta pri la internacia reto de firmaoj, laŭ principoj de EoC (Ekonomiko de Komunio en Libereco\*).



En la hodiaŭa scienc-situacio, la Nobel-premio por Angus Deaton atentigas pri aliaj, ofte neglektitaj faktoroj de la moderna ekonomiko: sociologion kaj politikon. Ĝis nun, politiko de la Stokholma komitato estis iom stranga. Tio evidentiĝas precipe en lastaj jaroj, kiam kapitalismo ŝajnas eniri la riskon de kolapso sub la premo de la sen-precedencaj financaj krizoj. La bona signo estas tio, ke dum lastaj jaroj la Nobel-premioj pri ekonomio estis donacitaj ankaŭ al tiuj kelkaj sciencistoj, kiuj ne nur difinas ekonomian kaj financan paradigmojn sed ankaŭ malkovras publike ilian tragedian limitecon. Oni povas tion kompari kun varmega somero, kiam oni premias specialistojn pri modernaj fajroestingiloj dum okazas krimbruligoj.

La ĉijara premio al prof. Deaton memorigas pri nomoj de aliaj laŭreatoj, pioniroj de la novaj vojoj: Amartya Kumar Sen – 1998, Joseph Stiglitz – 2001, Elinor Ostrom – 2009, Lloyd Shapley – 2012, Eugene Fama – 2013 kaj Jean Tirole – 2014. Ilia laboro kaj esploroj esperigas nin, ke la malnovaj tendencoj turniĝas jam al bona direkto. Ni ne forgesas pri la ekonomiaj kaj financaj krizoj kiujn multaj ĵus devis travivi. Tiuj krizoj ankoraŭ ne finiĝis kaj ili ne estas sendependaj de la ekonomiaj teorioj formulitaj en lastaj jardekoj. Kvankam tia rilato malsamas ekz. inter astrofizikistoj kies teorioj ne povas modifi la orbitojn de planedoj, tamen – kontraŭe al astrofiziko – ekonomistoj kun siaj teorioj forte influas la solv-eblecojn de la decidpovaj komisionoj. Dum la antaŭaj jaroj, la plej progresintaj ekonomiaj institucioj dungas multe da matematikistoj sen ĝenerala scio pri humanistaj kaj sociaj sciencoj. Tiel malvasta specialiĝo malfaciligas superrigardi la ekonomian sistemon laŭ ĝusta perspektivo. Pro tio, la modeloj de ili kreitaj ne kongruas kun la sociekonomia realeco.

Lastjaraj du premioj, tiu al Tirole en 2014 kaj la ĉijara al Deaton – povas indiki je reveno al eŭropecaj teorioj de ekonomiko. Tradicie, ili ampleksas la socian faktoron de ekonomio, pli senteman al kolektiva bono ol la usona – fokusita pri individua profito kaj riska je perturboj. Tia "tagiĝo" konfirmos eniron al nova vojo, kiam la sekvontjaraj premioj akcentos la socian, etikan kaj filozofian aspektojn de ekonomiko, entute pli adekvatajn ol tiu de nura matematiko. Brita ekonomisto Robert Sudgen en jaro 1991 esprimis la opinion ke "... La hodiaŭa ekonomisto bezonas reveni al la freŝaj fontoj por rigardi la problemojn ne nur kiel matematikisto, sed ankaŭ kiel filozofo". En pasinteco, tia invito ne povus esti rimarkita de profesiuloj en tiu segmento. Sed nun ni eble ne malfruiĝos.



Angus Deaton verkas ne nur artikolojn pri matematiko sed ankaŭ librojn, inter kiuj oni rekomendas legi precipe tiun laste eldonitan - "*Granda eskapo: sano, riĉeco kaj originoj de malegaleco*". En tiu libro la Nobel-premiito demonstras ankaŭ la scion pri sociologio, pro tio oni povas lin nomi prava heredanto de la klasika ekonomisto kaj filozofo Adam Smith.

Deaton starigas la demandon ĉu en estonteco la homaro ĝuos periodon de progreso *sen* malegaleco. Tio estas la fundamenta problemo hodiaŭ. Klare videblas, ke por la nuna progreso ni pagas troan prezon per la kreskanta malegaleco inter la kelk-elcenta grupo de "bonŝanculoj" kaj la cetera plimulto de la monda loĝantaro, senigata de la baza rajto al feliĉo. Ekonomio povas reveni al sia originala celo, por estiĝi denove la scienco pli sociema kaj morale pozitiva. Tia ŝanĝo povas okazi, se ni kuraĝos alfronti tiajn demandojn, kiujn oni evitas ĉar preferas paroli nur pri surpraĵaj temoj, senutilaj al homa progreso.

Luigino Bruni

Kompletan liston de la premiitoj vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Nobel-premio\\_pri\\_ekonomiko](https://eo.wikipedia.org/wiki/Nobel-premio_pri_ekonomiko). Verkinte ĉi tiun artikolon, ni memorigas ke tian premion en jaro 1994 ricevis esperantisto, s-no Reinhard **Selten**. Tre interesa kaj kuraĝa estis lia parolado en Eŭropa Parlamento: <http://liberafolio.org/2007/seltenparolado/>.

---

## Oceanio – eĉ de semoj malgrandaj . . .



Meze de la ĵus pasinta januaro renkontiĝis 540 homoj el diversaj partoj de Aŭstralio kaj 169 reprezentantoj el kelkaj insuloj de Oceanio: Kiribato, Nov-Kaledonio, Valiso kaj Futuno. Ili alveturis por partopreni en Mariapolis – unusemajna "urbeto" organizita sur Insulo Philip (14 kmj sudoriente de Melbourne / *Melburno*). Plimulte tio estis familioj kun infanoj kaj junularo; venis ankaŭ la novaj loĝantoj de Aŭstralio (rifuĝintoj el Sirio kaj el Burundo). Oni elektis la ĉeftemon "Konstrui unuecon en multkulturismo" - kio tre aktualis por la evento, kiun partoprenis la homoj de malsamaj kultur-fonoj.

Precipe interesa estis kontribuo de la Pacifikaj insulanoj pro la egzotikaj vestaĵoj, muziko, dancoj ktp. Antaŭ ilia alveno, oni sukcesis kolekti monon por pagi iliajn vetur- kaj loĝkostojn. Ne facilis veturi por Kiribato-grupo ĉar tie estas granda senlaboreco, pro kio estis riske forlasi laboron ĉe la maro – eĉ por unu semajno. Tamen alveninte, ili tre ĝuis amikecan etoson de tiu internacia evento. Ĉiu tago finiĝis – kvazaŭ veturo ĉirkaŭ la mondo – per celebrado de alia nacia kulturo kaj oni povis praktike sperti ke unueco de la popoloj ne estas utopia. Alvenintoj el Oceanio estis invititaj pasigi sekvan semajnon en Melburna Fokolara Centrejo kaj partopreni kursojn pri familia vivo. Aktivecoj en tiu kursaro agordigis ilin per la entuziasmo, kiun ili portos al siaj insuloj.



Tiuj travivaĵoj esperigis ilin kaj denove pravigis la proverbon ke "eĉ grandaj fruktoj maturiĝas de malgrandaj semoj".

\*

---

Nova Urbo (New City / Città Nuova) estas internacia magazino eldonata de Fokolara Movado en kelkdeko da lingvoj. Ĝi antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj kaj komunumoj, kaj krome – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996. Sekvajare, dum sia vizito en usona urbeto Mariapolis-Luminosa, ŝi pozitive respondis al nia propono eldonadi la bultenon "Nova Urbo" en Esperanto.

Internacian Jaron de Guŝoj (IJG-2016) anoncis la UN dum sia 68a Ĝenerala Kunveno, aŭtune 2013. Pri realigo de "IJG-2016" respondecas Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo (NAO, angle: Food and Agriculture Organization – **FAO**) kunlabore kun registaroj kaj aliaj organizaĵoj. Nun vi povas rigardi tre belan, unu-minutan filmeton, kiun FAO kuraĝigas diskonigi: <https://www.youtube.com/watch?v=xggFJvltVco>. IJG-2016 celas atentigi publikan opinion pri nutraj valoroj de guŝoj por la tutgloba loĝantaro.



## Jaro de Guŝoj

La ĉijara IJG kuraĝigas pliriĉigi la manĝoĉenon per pli ofta uzado de guŝ-proteinoj tra mondaj manĝomerkatoj kaj aplikado de guŝaro en kultivocikloj.



Ĉi tie vi trovas la oficialan IJG-retpaĝon en ses lingvoj (*ĉina, araba, angla, franca, hispana kaj rusa*): <http://www.fao.org/pulses-2016>. Antaŭe oni ne sufiĉe alte taksis avantaĝojn de tiaj rikoltoj, kiuj inkludas pli da fazeolo, pizo kaj aliaj guŝoj. Sed ili certe faciligos atingi futuran sekurecon de la monda nutrado.

**2016**  
**INTERNATIONAL**  
**YEAR OF PULSES**

Guŝaj semoj kaj fruktoj estas la dua (post cerealoj) plej grava fonto de plantaj manĝaĵoj por la homo. En agrikulturo oni vaste uzas guŝojn al *verda sterkado* kiel antaŭrikolto en kultiv-ciklo, ĉar ili plej efike taŭgas por nitrogena fiksado. Per tiu biokemia proceso la grundo fekundiĝas, sen kio maleblas akiri bonajn rikoltojn. Eble sonas ironie la memorigo ke la t.n. "Verda Revolucio" en la pasinta jarcento kaŭzis malkreskon de la guŝ-rikoltoj ĉar tiam oni promociis ĉefe grajnoj (kiel ekz. tritiko, maizo kaj rizo). Hodiaŭ oni konfirmas, ke guŝoj enhavas duoble pli da proteino, mineraloj, amelo, dieta fibro kaj mikroelementoj ol aliaj popularaj plantoj. Pro tio, pli kreskigo kaj surmerkatigo de guŝoj certe helpos redukti la nesufiĉan kvanton de tiuj mineraloj kaj aliaj mikroelementoj en la ĉiutaga nutrado.



Malgraŭ la klimat-ŝanĝoj, Afriko povas nutri Afrikon

Precipe tio validas por evolulandoj, kie guŝoj helpas atingi nutrosekurecon per sufiĉaj rikoltoj en daŭripova agrikulturo. Ekzemple unu el la plej malriĉaj landoj - Etiopio apartenas hodiaŭ al grandaj produktantoj de kikero (sesa pozicio en la mondo!). Ĉar mankas tie rimedoj kaj teknologio, antaŭ nelonge oni instalas en tiu lando tre grandan kaj plej modernan maŝinaron kiu plibonigos prilaboradon de rikoltitaj plantoj. Cetere, ankaŭ la okcidentanoj devus rekonsideri pli oftan uzadon de la guŝoj kaj de aliaj freŝaj manĝaĵoj anstataŭ amase aĉetadi tiujn konservitajn kun malalta nutraj kvalito.

Plurjaraj esploroj pri la digesta sistemo fariĝis turnopunkto en la nutroscienco. Ili pruvis ke nombro de la utilaj mikroboj konstante malkreskas en intestoj de la homoj vivantaj en la Okcidento.

Kaŭzas tion la pli kaj pli populara manĝado de fizike kaj kemie transformitaj produktoj, en kiuj mankas tiaj elementoj, per kiuj vivas la menciitaj mikroskopaj organizmoj. Se tia tendenco daŭros plu, tiam la necesaj por nia sano mikroboj formortos kio estus tre danĝera por sano de la sekvontaj generacioj. Tio ne minacas al loĝantoj de tiuj regionoj kaj vilaĝoj, kie oni manĝas simplajn kaj freŝajn produktojn. Evidentiĝas, ke guŝoj havas tre gravan rolon por plibonigi homan sanon, al kio ili kontribuas per sia riĉ-enhavo de proteino, mineraloj, mikronutraĵoj kaj diet-fibro. Do la iniciato de UN pri "Jaro de Guŝoj" estas la ĝustatempa atentigo, ke en niaj kuirejoj estu pli ofte uzataj guŝoj kaj freŝaj plantoj kaj malpli da viando aŭ produktoj fabrike preparitaj en ladskatoloj, plastikaj boteloj ktp.



Por prepari bongustan manĝaĵon el guŝoj, vi trovos facile amason da receptoj.



Fine de januaro estis oficiale inaugurita Internacia Jaro de Guŝoj (IJG / "IYP-2016") en diversaj partoj de la mondo: en la ĉefurbo Madrido (**Hispanio**), en Mersin-provinco (**Turkio**), Santa Rosa (**Ĉilio**) kaj **Usona** Kulinara Instituto en Napa Valley, proksime al kalfornia ĉefurbo Sacramento. En tiu lokoj okazis ne nur konferencoj aŭ komercaj ekspozicioj sed ankaŭ gustumado de guŝ-manĝaĵoj kaj prezentado de kuir-arto en famaj restoracioj. Amaskomunikiloj peradis en kontaktoj inter lokaj farmistoj, vendejoj kaj klientoj.

### Kalendaro de aliaj IJG-eventoj:

**Februaro:** **Franca** Ministerio de Agrikulturo kun la Nacia Federacio de Guŝ-produktantoj organizas konferencon en Parizo. \* Simila konferencoj okazos en Londono kaj **svisa** urbo Lausane (Laŭzano). \* En Jaipur (norda **Hindujo**) oni organizas ekspozicion kaj panel-diskutoj kun la partopreno de guŝ-vendistoj, komercaj firmaoj ktp. \* **Kanada** Instituto de Manĝosciencoj organizos tutlandan konferencon en Vancouver. Tiam oni decidis kiu provinca teamo preparos la plej bonan vegetaran "hamburgeron" el guŝoj. Gis lasta decembro, la plej bongustan veg-burgeron (aŭ, pli precize: "guŝburgeron" el pizo, lento kaj kikero) faris studentinoj el Ontaria Guelph-Universitato kaj teamo de Manitoba Red River College kiu produktis *guŝburcherojn* el kikero, lento kaj nigra fabo.



Legomaj kaj guŝaj merkatoj tre popularas en la tuta Afriko

Tre prestiĝa evento estos la Tut-Afrika Konferenco pri Guŝoj titolita "Legumes4Afrika" (Guŝoj por Afriko) kiu okazos en **Zambio**, samtempe kun Monda Konferenco pri **Vigno** (*Vigna unguiculata*). Sub aŭspicio de zambiana Ministerio pri Agrikulturo kaj Brutoj, organizos ĝin Internacia Instituto pri Tropika Agrikulturo (IITA), Laboratorio pri Kooperativa Esplornovigo de Guŝoj, Tut-Afrika Alianco por Esplorado de Pizoj (PABRA), Internacia Centrejo por Tropika Agrikulturo (CIAT) kaj Internacia Esploro de Duon-aridaj Tropikoj (ICRISAT - Esplora Programo pri Guŝoj).

**Marto:** En la Nagano-provinco (**Japanio**) lokita nord-okcidente de Tokio, la Mondan Ekspozicion de Guŝoj organizos granda entrepreno Foodex. Unuafoje partoprenos en ĝi ankaŭ manĝ-produktantoj el Orienta Eŭropo (Belarusio kaj Litovio).

**Aprilo:** **Kostariko** gastigos Konferencon pri Mez-Amerikaj Kooperativaj Rikolt-programoj. \* "Guŝoj kiel Porsana Nutraĵo kaj Nutraĵ-sekureco en Aridaj Klimatoj" estos alia konferenco en **Maroka** urbo Marakeŝo.

**Majo:** 5-a Inter-lerneja Konkurso pri Guŝoj okazos apud urbo Durban (**Sud-Afriko**).

**Julio:** **Kanada** Asocio de Specialaj Rikoltoj organizos Kongreson pri "Guŝoj kaj Aliaj Plantoj" en Toronto.

**Aŭgusto:** 28a Festivalo de Lentoj en urbeto Pullman (nord-okcidenta **Usono**).

**Oktoebro:** Festivalo de Manĝaĵoj okazos en vilaĝo Felton (30 kmj de Sydney, **Australio**). \* 2-a Lisbonan Konferencon organizos Internacia Guŝ-Societo (**Portugalia**). \* Simpozio "**Japana** Tago de Faboj" estos organizita en Tokio.



En Bangladeŝo oni povas kreskigi guŝojn tutjare



Guŝ-Instituto en Hindujo:  
agrikulturaj maŝinoj plibonigas rikoltadon

**Novembro:** Konferenco pri Plantaj kaj Bestaj Genaroj (Genomoj) okazos en urbo Jining (esperante: Ĝjining, orienta **Ĉinio**), apud 1776-kilometra *Granda Kanalo* kiu ligas Pekinon kun Ŝanhajo. \* Internacia Konferenco "Guŝoj por Nutraĵa Sekureco kaj Agrikultura Daŭripovo" okazos en la ĉefurbo New Delhi (Nov-Delhio, **Hindujo**).

---

## Espero por iraka Kurdio

Raporto de instruisto el rifuĝejo

Mi vivas en urbo **Arbilo** (norda Irako) kaj instruas kurdajn infanojn ekde jaro 2010 – diras Malu Villafane, naskiĝinta en Filipina Insularo. En pasintjara somero, ĉi tiu loko estis transformita je tendaro por rifuĝintoj el urboj Singar, Mosulo (tra kiu fluas rivero Tigriso) kaj la ĉirkaŭaj tiaj vilaĝoj kiel Karakuŝ (Qaraqush), Aramleŝ kaj Bartala.

La rifuĝintoj alvenis panike, kiam la t.n. "islama ŝtato" invadis ilian regionon kaj komencis persekutadon, sangavidajn torturojn, mortigadon. Kiu travivis la kruelaĵojn, forlasis ĉion kaj eskapis al Kurdistano.



Lokitaj en la nova loko, ili ne povas liberiĝi de pesimismo kaj timo, kio kreas tre pezan atmosferon. Inter la rifuĝintoj troviĝas tre multaj infanoj, ofte orfoj. Kun miaj gekolegoj kaj personoj kiuj prizorgas la rifuĝejon, ni komencis organizi diversajn aktivadojn por infanoj kaj gejunuloj.

**En lastaj jaroj oni gastigas tie ne nur kristanojn sed ankaŭ reprezentantojn de islamanoj, jezidoj, kurdoj, turkmenoj kaj de aliaj etnaj aŭ religiaj grupoj. Kiel ili kunvivas en tiel limigita loko?**

Ili respektas unu la alian kaj faras multaj aferoj kune. Dum ĉi tiu krizo, multaj kurdoj gastigas rifuĝintojn en siaj domoj, tamen ili ne povas pardoni tian maskradon. Mi laboras kun kurdoj, turkmenoj, araboj kaj kun eksterlandanoj.

## **Kiam tiu krizo komenciĝis en Arbilo kaj kie oni trovis loĝlokojn por la rifuĝintoj? Kion oni faros en la sekvontaj monatoj?**

La amasa fuĝado komenciĝis en junio 2014 kaj kulminis plej drame post du monatoj.

Tiuj homoj perdis ĉion: domojn, laboron, lernejon.



Rifuĝ-tendaro por kurdoj

Multaj ne trovis novan lokon por ekloĝi, do ili petis helpon ĉe la preĝejoj, eniris malplenajn konstruaĵojn aŭ restis simple sur la stratoj.

Foje la infanoj sukcesis trovi siajn parencojn, se havis bonĝsancon. Diversaj ne-profitaj organizaĵoj, kunlabore kun la Eklezio, reagis tuj al tiu krizo. Sed ili tute ne havis tempon por sin prepari al helpado grandskala.

Ĉio mankis al tiuj teror-viktimoj. Tiutempe la temperaturo atingis inferan altecon de 50°C, sed kiam venos vintro – estos tro malvarme.

Ni ne disponas pri sufiĉa nombro da tentoj por loĝigi ĉiujn familiojn. En kelkaj tendaroj mankis manĝaĵo kaj akvo dum longa tempo. Tamen la infanoj ĉiam pli facile ĝuas la vivon. Ili komencis rideti kaj ludi ekster la tendaro, en parko aŭ lageto. Vidante tion, iliaj gepatroj eble retrovas esperon. Tio videblas, kiam ili volonte purigas la tendaron, preparas komunajn manĝojn aŭ pli ofte pretas helpi. Akompane ilin en ĉi tiu drama situacio, mia persona vivo tute inversiĝis. Mia restado en Irako helpis min kompreni tre profundan sencon de la vivo: labori por universala frateco.

### **Tamen via laboro ne solvos la tutan krizon. Do, kio igas vin labori en ĉi tiu tendaro?**

Se mi rigardas la situacion nur el humana vidpunkto, tiam verŝajne mi perdus la kuraĝon kaj eble eĉ forkurus de ĉi tie. Sed mia kredo fortigas min kaj helpas transiri la suferojn, kiuj apudas en tiuj malfeliĉaj homoj. La konataj vortoj de Evangelio: "*Mi estis malsata kaj vi manĝigis min, mi estis senhejma kaj vi gastigis min...*" inspiras ke mi alfrontu pacience la malfacilaĵojn de ĉiutaga vivo en la rifuĝejo.

Ne estas facile priskribi ĉiujn suferojn, se mi vidas la homojn kiuj perdis ĉion kaj troviĝas en malespera situacio. Tia sperto plilarĝigis mian koron por en ĉiu homo vidi mian fraton aŭ fratinn. Tiel ni povas semi la pacon ĉiutage, pacience – paŝon post paŝo. Eĉ la naturo montras, ke ankaŭ altaj arboj komencis kreski el malgrandaj semoj.

## **UNO apogas la por-pacan renkontiĝon**

Sub aŭspicioj de la Unuiĝintaj Nacioj okazos kelklanda renkontiĝo nomita *Ĝenevo-3*. Registaroj de kelkaj landoj interparolos kun multaj opoziciaj grupoj el Sirio kaj serĉos solvon por fini la monstran militon de tiu suferigata nacio.

Por gardi sekurecon al kurda popolo en norda Sirio (situita laŭ landlimo kun Turkio), gvidantoj de la kurdaĵ memdefendaj komunumoj kaj politikaj partioj konsentis pri la neceso renkontiĝi kun reprezentantoj de la siria registaro. Tiucele al urbo **Al-Kamiŝli** (Qamishli) veturis altranga delegacio el Damasko sub la gvido de ministro pri defendo, M.al-Shaar. Nacia Konsilantaro de Kurdistan en Sirio (ENKS) volas atentigi la mondon pri situacio de kurdoj, precipe dum la proksimaj interparoloj en svisa urbo Ĝenevo. La konvenan al Ĝenerala UN-Sekretario peticion subskribis pli ol miliono da personoj. Bedaŭrinde – kiel diris en Ankaro la turka ministro pri eksteraj aferoj M. Çavuşoğlu – Turkio bojkotos tiun porpacan eventon, se partoprenos ĝin reprezentantoj de Kurda Demokrata Partio el Sirio.



Tio mirigas des pli ĉar kurdoj batalas kontraŭ la terorista “islama ŝtato” apogata oficiale de Sauda Arabio - amiko de Usono, Kataro (kaj ... Turkio?) - jen la bildo de tipa politika ĝangalo. Ĉu pri sia estonteco ne devus decidi nur la siria nacio, sen eksterlandaj “helpantoj”?

Dum pli ol 100 jaroj, la situacio de kurdoj en Turkio estas tre malfacila, ĉar la tieaj registaroj daŭre rifuzas agnoski lingvan kaj kulturajn rajtojn de la pli ol 10-miliona kurda minoritato. Unu el eksaj UEA-prezidantoj komunikis oficiale kion la mondo “neoficiale” scias: Kurdoj restas la plej granda nacio, kiu ankoraŭ ne posedas sian propran ŝtaton. Entute en la mondo vivas pli ol 23 milionoj da kurdoj, el kio ĉ. 14 milionoj en Turkio (20 elcentoj de la tiea loĝantaro). Kurda lingvo apartenas al hindeŭropa lingvaro (irana grupo) kaj uzas 31-literan alfabeton.

Konata, ankaŭ inter la esperantistoj, usona lingvisto **Noam Chomsky** kuraĝe kritikas la usonan registaron ke ĝi faras nenion por protekti la kurdan loĝantaron. Li kondemnas tian sintenon ĉar Usono armigas Turkion per 80% kaj murdado de tiu sendefenda popolo daŭras jam pli ol 20 jarojn.



Sur la foto: N.Chomsky kaj kurdaj infanoj dum la vizito en Turkio, februare 2012.



Kurda familio

Chomski nomas tion "la plej terura ekzemplo de la ŝtata terorismo en la mondo". Antaŭe, pli ol cent sciencistoj en Turkio kaj eksterlande subskribis la peticion "*Ni ne partoprenos en tiu krimego!*" sed turka prezidento **Recep Erdogan** nomis ilin ignorantoj kaj la prokur-oficejo ordonis aresti la subskribintojn. Fondaĵo de Homaj Rajtoj informis ke pasint-somere, nur en unu tago 162 sendefendaj homoj perdis la vivon. Tio okazis dum turkaj soldatoj serĉis la ribelantojn en la sud-orienta regiono kie plimulta loĝantaro estas kurdoj. Ekde la pasinta jaro, la turka registaro endanĝerigas vivon de siaj 200 mil civitanoj en sudorientaj regionoj de Turkio kaj minacas kurdajn komunumojn per "kolektiva puno" dum la polic-ĉasado de ribeluloj.



Kiel konfirmis turka novaĵ-agentejo Anadolu, iliaj militaviadiloj atakis kurdojn ankaŭ en norda Irako (malgraŭ protestoj de iraka registaro). Por pli ĝenerala perspektivo, valoras informi ke la registaroj en Irako, Sirio kaj parte en Irano rekonis jam aŭtonomion de la kurdaj regionoj. Vi povas ĉi tie aŭskulti iom da kurda muziko:

<https://www.youtube.com/watch?v=wUXcfTu9bPU> kiu ŝajnas esprimi la jarcentajn sopirojn al libereco.

Por ne fini ĉi tiun artikolon pesimisme, bonvolu aŭskulti kurdan junularon, kiu – kiel ĉiuj gejunuloj en la mondo – vivas kun espero kaj persistas fidi je pli bona estonteco: [https://www.youtube.com/watch?v=AR\\_b0DSsyBc](https://www.youtube.com/watch?v=AR_b0DSsyBc). Certe ni ĝojus, se la bravaj TEJO-aktivuloj sukcesos varbi tiujn knabinojn al Esperanto...

# Padoj al longa vivo (parto 2)

Malsanoj komenciĝas plej ofte pro kelkaj kialoj. Povas ilin kaŭzi tiaj faktoroj kiel: manko de la korpa energio kaj malfortiĝo de la imuna sistemo, naturmedio, emocia aŭ spirita kaoso. Pro tio, la fundamentan rolon havas ĉi tie simpla kaj natura manĝaĵo, ekvilibro de la emocioj kaj kapableco transiri nervostreĉojn. Kiam ni atentis pri nia sano antaŭ ol venos malsano, ni evitos multe da suferoj. Kuraci malsanon post kiam ĝi atakis nin, similas al fosado de puto nur kiam vi sentas soifon. Juna homoj ofte neglektas la principojn de sana vivstilo kaj kiam ili maljuniĝas – estas jam tro malfrue profiti de la pasinta vivenergio. Tial ne prokrastu zorgi pri via sano ĝis la tempo en kiu vi fariĝos malsana. Komencu tion eble plej frue, eĉ kiam vi estas sana, ĉar tiumaniere multe pli facilas konservi bonan sanon por la sekvontaj jaroj.

Multaj t.n. problemoj originas en la menso. Tio estas niaj absorbaj zorgoj kaj antaŭtimoj pri la estonteco, nia obsesa sinkroĉo al pasintaj maljustecoj, nia konstanta analizado de ĉiuj flankoj de la vivo – jen la oftaj kaŭzoj de la ĉagrenoj kaj suferoj. Liberiĝi de ili signifas rafini la spiriton kaj detranĉi sin de la mensaj obstakloj. Jenas la konciza klarigo de Lao-Tzi (**Laozio**): *Se vi estas deprimita, vi vivas en pasinteco. Se vi estas maltrankvila, vi vivas en la futuro. Se vi sentas internan pacon, vi vivas en la nuna – sole reala tempo.* La sinteno resti trankvila kaj sintene pozitiva, influas pozitive niajn energion kaj sanon. Strebi senpacience por estiĝi forta, igos nin malforta. Sed kiam ni lernas kiel fariĝi malstreĉa kaj mola – ni trovas nian veran forton. Tial taoismo konsilas: trankviliĝu, restu kvieta. Ĉagreni pro la problemoj ne forigos ilin. Vivi en pasinteco izoligas vin de la reala vivo. Timi pro la estonteco mizerigas vin kaj malebligas utiligi la nunan tempon. Vivante en la daŭra nuno, vi regas ambaŭ: same pasintecon kiel futuron.

## Kompletiga polus-ekvilibro

Al taoistoj, la universo estis dividita je du polarecoj: *ying* kaj *yang* (jino, jango). Tiumaniere, ĉiuj elementoj estas parigitaj, unu kompletigas la alian kaj ili ambaŭ kunkreas ekvilibron. Konsciaj pri tia inter-dependo, ni homoj povos vivi harmonie kun la universo.

La du polarecoj konsistas el kvar ĉefaj elementoj:



<i>Yang</i> / vireco	<i>Ying</i> / virineco
Suno	Luno
Tago	Nokto
Lumo	Ombro
Seko	Humideco

Al *yang* (vireco) kaj *ying* (virineco), taoismo atribuas kontraŭajn kvalitojn:

<i>Yang</i> /vir	<i>Ying</i> /in
Brilo	Mallumo
Warmo	Malvarm(et)o
Hasto	Malrapido
Aktiveco	Ripozo
Kuraĝo	Subtileco
Agreso	Kvieto
Malglata	Delikata
Grandeco	Detalemo
Ekspansio	Ricevemo
- eksteren	- interne
- alten	- malsupren
Rekta	Kurba
Simpleco	Komplekso

Tiumaniere, ambaŭ kontrastaj "polusoj" (= la du seksoj) harmonias unu kun la alia. Formante ekvilibron, ili riĝas sin reciproke. Eble pro tio, la delikataj virinoj – simile kiel la du kontraŭaj magnetpolusoj – allogas virojn. Aliflanke, la sentempa patrino soifas je la natura familio kaj, por kreskigi la infanojn, bezonas apogon de ilia patro. Tiun ĉi antikvan saĝecon de Oriento konfirmas la naturo mem, same en ĉiuj bestospecioj: patrino naskas la idojn kaj, eĉ malfortigita, tuj ilin nutras. Pro tio, la tasko protekti la idojn kun patrino – apartenas al forta kaj kuraĝa patro.

Ni ĉiuj havas emociojn, sed valoras memori ke tiuj emocioj estas fakte statoj de la energio. Ili povas kontribui al nia vivoforto aŭ ĝin elĉerpi. Pro tio evitu ekstremajn emociojn, precipe en pli-aĝo. Kvankam malfacilas emociojn regi, tamen emocia ekvilibro estas unu el esencaj kondiĉoj de bona sano. Nenio drenas energion de la korpo tiel komplete, kiel subita eksplodo de emocioj. Ankaŭ nenio alia povas tiel abrupte interrompi harmonian funkciadon de la internaj organoj. Sed ni mem povas uzi nian internan korp-energion por iĝi pli malpeza, saĝa kaj pli kompatema.



Ŝlosilo al bona sano estas *modereco* en ĉio: same en aktivado fizika kiel en la emocia vivo. Nenio pli malbonas ol ne scii kiam sufiĉe signifas "ne plu" (la ekzemplo estas nesatigebla avido je multaj posedaĵoj). Homo, kiu scias kiam sufiĉas, havos ĉion sufiĉe.



Tenu ekvilibron en viaj vivoritmoj kaj agoj.

Unu el sekretoj de longa vivo estas fari nenion troe. Praktike tio signifas: ne manĝi tro multe, ne dormi tro longe, ne gimnastiki tro rapide k.t.p. Energio malsaĝe uzita kaŭzas elĉerpiĝon kaj, se ripete trouzata dum longa tempo, mallongigas la vivon.

Ne investi multan energion je emocioj en iu ajn nervostreĉa situacio, helpas nin lerni kiel esti ne sklavo, sed mastro de niaj emocioj. Trankvila mens-ekologio kaj serenaj pensoj faciligas uzi la emociojn por krea agado kaj vivi pli bone. Ekvilibro de la emocioj kapabligas nin rezisti negativajn influojn de ekstero. Alikaze, se ni ebligas ke aliaj homoj influu nin ofte, rezulte ni neniam atingos emocian sendependecon, necesan por la mensa kaj spirita kulturo.

Moviĝado tro rapida ruinigas la sanon kaj sekve malebligas realigi bone niajn planojn. Ni perdas la grundon kaj ekvilibron. Por plilongigi la vivon, taosistoj konsilas malrapidigi ĉion. Homoj observantaj tiun principon estas pli fortaj en korpo kaj klaraj mense; ilia vid- kaj aŭd-kapabloj funkcias pli efike. Ili ne plenigas sian menson per troaj zorgoj kaj pli facile adaptiĝas al ŝanĝeblaj situacioj.



### **Festina lente** (E-traduko: Saĝulo rapidas malrapide)

Do malrapidu, kara Leganto - por medite ordigi la pensojn, rigardu ĉion desupre, laŭ ĝia (mal-)graveco kaj en longa perspektivo. Laozio memorigas, ke "*La naturo ne rapidas sed ĉion plenumas laŭ siaj propraj ritmoj. Saĝa homo estas, kiu neniam rapidas kaj tamen finas ĉion ĝustatempe*". Multaj rimarkis, ke certaj fundamentaj veroj ripetiĝas en diversaj kulturoj kaj en la grandaj religioj. Kiel vi supre legis, tia universala valoro estas i.a. la geedza amo kiu ekfloras inter viro kaj virino por frukti mirinde per nova vivo de la sekvontaj generacioj. Alia nerefutebla vero estas la eterna leĝo pri ĉiesa forpasado laŭ sinsekvaj sezonoj kaj ritmoj de la naturo. En antikva Grekujo, tre koncize kaj trafe tion esprimis filozofo **Heraklito** (vivanta inter 540 kaj 480 a.K): "Panta rei" (πάντα ῥεῖ - en la greka), esperante - "*Ĉio estas fluanta*". Tio signifas, ke ŝanĝiĝas konstante la mondo en kiu ni vivas. Konfirmas tion observado de la naturo: tago sekvas nokton, printempo vintron, varmo malvarmon, ĝojo malĝojon ktp. Aŭstralia muzikgrupo "The Seekers" (Serĉantoj) kantas pri tio dum rikoltado de vinberoj: <https://www.youtube.com/watch?v=VRg9NklDjVs> (La tradukitan tekston vi trovas ĉi-sube).

### **Turn, turn, turn** / *Ĝustos la temp' – temp' – temp'.*

Rekantaĵo:

(Teksto originala):  
*To every thing, turn, turn, turn*  
*There is a season, turn, turn, turn*  
*And a time to every purpose under heaven.*

(Estas do tempo)  
 por konstrui kaj tempo por malmunti;  
 tempo por danci kaj tempo por funebri;  
 tempo por ĵeti ŝtonojn kaj tempo por ilin kolekti.  
 Rekantaĵo: *Al ĉio venas...*

Rekantaĵo (tradukita):

*Al ĉio venas temp' temp' temp'*  
*kiam proksimas la ĝusta sezono;*  
*kaj ĉio sub la ĉielo havas la sencon.*

(Estas do tempo)  
 por ami kaj tempo por malŝati;  
 tempo milita kaj tempo porpaca;  
 tempo por iun brakumi  
 kaj tempo por eviti brakumadon.  
 Rekantaĵo: *Al ĉio venas...*

Estas do tempo por kreskigi  
 kaj tempo por rikolti;  
 tempo por vundi kaj tempo por kuraci;  
 tempo por ridi kaj tempo por plori.  
 Rekantaĵo: *Al ĉio venas...*

(Estas do tempo)  
 por gajni kaj tempo por perdi;  
 tempo por disŝiri kaj tempo por semi;  
 tempo por ami kaj tempo por malŝati.

(Estas do tempo)  
 por konstrui kaj tempo por malmunti;  
 tempo por danci kaj tempo por funebri;  
 tempo por ĵeti stonojn kaj tempo por ilin kolekti.  
 Rekantaĵo: *Al ĉio venas...*

Kaj tempo por paco – mi ĵuras  
 – neniam estas tro malfrua.

La kanton "Turn, turn, turn..." verkis Pete Seeger – unu el ĉefaj figuroj de la muziko inspirata de folkloro (la t.n. *folk music*). Lia teksto baziĝas je versoj de ekleziasto Kohelet, vivanta en 3-a jarcento a.K. Ili enhavas saĝecajn meditojn pri la homa vivo, kies mallongecon bone komprenis la ekleziasto: "*Vanitas vanitatum et omnia vanitas*" (Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo). Seeger estis nur iom pli ol 30-jara kiam verkis la kanton kaj, spite al tiu melankolia reflekto, li estis bonhumora homo kiu vivis preskaŭ 95 jarojn!

## Teo-kulturo



Unu el gravaj tradicioj de Oriento estas la "ceremonio de teo" (aŭ *te-ceremonio*). Teo estas rigardita tie kiel la "vojo"-Tao al trankvileco. Sidante en silento kun taso da bonkvalita teo, oni povas aprezi valoron de la pasantaj minutoj – ne per vortoj sed tra sentoj. Nur en kvieta mensostato, la trinkanto kapablas trovi trankvilecon kiu fluas kun la teo. Trankvileco kontraŭas distremon: ajna ekscito malebligos rekoni la serenan etoson. Kiam la meditado ne koncentriĝas je unu punkto, tiam ne eblas trovi la veran teokvieton. Pro tio estis formulita la diraĵo, ke "teo kaj meditado gustas same".

En antikva Ĉinujo oni kreis la tutan filozofion pri "La stilo de teo" (*cha tao*, esp: **ĉatao**, angle "The Way of Tea"). La tradicio diras, ke mastroj de la te-ceremonio kapablis ne nur diveni specon de ĉiu teo, sed ankaŭ identigi fonton el kiu oni ĉerpis akvon por la teo! *Ĉatao* engaĝas internan pacon, revenon al la "centro" por ĝui simplecon kaj valoron de la kuranta momento. Por komenci dieton pli bonan al sano, ŝanĝu ankaŭ la trink-manierojn. Anstataŭ kafon aŭ malnature produktitajn fluaĵojn, uzu pli ofte **verdajn teon**, kiu (verŝajne) reduktas kolesterolon kaj malaltigas sangopremon.



Verda teo estas preparata el folioj de ĉina teo-arbusto (*Camellia sinensis*)

Fine de la 12-a jarcento, budha monaĥo Eisai (esperante: *Eisajo* ?) enkondukis verdajn teon al Japanio kaj verkis "Libron de teo" (*Kissa Yojoki*). En sekvontaj jarcentoj tiu teo populariĝis en aliaj landoj de Azio. Ĉi tie sekvas aldonado, ĉerpita el diversaj inform-fontoj. Nuntempe oni uzas verdajn teon ankaŭ en okcidentaj landoj ĉar montriĝis ke ĝi helpas bruligi grasohistojn kaj tiumaniere faciligas batali kontraŭ trodikiĝo. En sia libro, la supre menciita Eisai indikas kelkajn avantaĝojn de tiu teo: ĝi forigas soifon, helpas digestan sistemon, pozitive influas internajn organojn (precipe koron), stimulas energion, evitigas dormemon kaj lacon. Esploristoj teoriumis, ke unu litro de la ĉiutage trinkita verda teo pridonacas homan korpon per polifenoloj kaj aliaj antioksidantoj kiuj forigas kelkajn malbonajn substancojn. Tio, laŭ ilia opinio, plibonigas funkciadon de sangocirkula sistemo. Oni ankaŭ opinias, ke verda teo malgrandigas riskon de kor-malsanoj kaj bremsas kelkajn kancer-speciojn, kvankam ne ĉiuj sciencistoj tion konfirmas.

Necesas aldoni, ke teo estas unu el plej popularaj trinkaĵoj en la mondo. Oni faras ĝin el diversaj specioj de teo-arbustoj, originale kreskantaj en Azio.

La detale formulita te-ceremonio – *chanoyu* (**ĉanojo**) estas la tradicia rito en Japanio. Oni observas strikte tiun "japanan skolon" eĉ hodiaŭ, kvankam ĝia komenco radikas jam en la 16-a jarcento.



Fama estas la teo de Srilanko, insulo kiu apartenas al plej grandaj eksportantoj de teo mondscale. De tie veturigis ĝin angloj al Eŭropo en la 18-a jarcento kaj sekve la "**cejlona teo**" tre populariĝis en la tuta kontinento kaj, tra eksaj anglaj kolonioj, ankaŭ en Nordameriko kaj Aŭstralio.

Kutime angloj ĝuas ĉiutage la postagmezan teo-horon kaj, nemirige, unu ilia teo-marko nomiĝas *Five o'clock* = kvina horo postagmeze. En Sudameriko populara teo *Yerba mate* (ma-teo) estas preparita el folioj de paragvaja ilekso (*Ilex paraguariensis*). Ŝategas ĝin i.a. argentinaj gaŭĉoj (brut-paŝtistoj). En Rusio, Irano kaj en kelkaj aliaj landoj de Mez-Azio oni uzas specialan bolkruceton, kiun oni nomas "**samovaro**". Loĝantoj de diversaj regionoj preparas teon uzante lokajn plantojn, herbaĵojn, diversajn florojn aŭ fruktojn. Do fakte oni povas paroli pri vasta "kulturo de teo" kiu emigas homojn ariĝi kaj pasigi komunan tempon agrable.

Nia rubriko pri utilaj plantoj montris, ke relative multaj esperantistoj interesiĝas pri la naturo. Temas ne nur pri fruktoj, legomoj aŭ herboj, sed ankaŭ pri naturprotektado kaj vivo /ripozado en la naturo. Tiu socia fenomeno populariĝas je pli vasta skalo, ĉar homoj preferas pasigi tempon ekz. en parkoj, apud lagoj aŭ riveroj anstataŭ surstrate. Tre agrablas vizitoj al vilaĝo en kiu vivas nia familio kaj precipe ĝuas tion la infanoj. Observante tiajn tendencojn, ni malfermas la novan, pli grandan rubrikon: '**NIA VILAĜO**' - pri la vivo pli proksima al la naturo. Bona okazo al tio estas la "2016 – Internacia Jaro de Guŝoj" por kiu ni prilaboris iom da ilustrita materialo. Kelkaj aldonaj artikoloj pri tiu ĉi temo aperos en la sekvonta numero.

## Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*



Utila plantaro:

### Guŝoj (Legumoj\*)

Semoj de guŝplantoj estas uzataj ekde la plej malnovaj tempoj. Arkeologoj malkovris, ke fagsemoj estis manĝataj jam en ŝtonepoko kaj poste, en la epokoj de bronzo kaj fero. Antikvaj skribaĵoj de **Haldeo** kaj **Egiptio** ankaŭ mencias pri fabo kaj lento. Sojfabo estis konata en **Ĉinujo** antaŭ 5,000 jaroj kaj tie oni tre honorigis tiun planton. Tra pluraj jarcentoj, guŝojn manĝis kamparanoj kaj tio estis por ili baza fonto de la necesa proteino. Poste, la plej riĉaj socigrupoj limigis manĝadon de plantoj kaj komencis uzi pli da viando kaj procesigitaj produktoj. Tamen montriĝis, ke guŝoj estas tre gravaj por la sano. Tamen necesas memori, ke ili ne restu en provizejo pli longe ol unu jaro. Krudaj guŝosemoj ne taŭgas por manĝado; la dommastrinoj scias, ke necesas ilin kuiri multe pli longe ol aliaj plantoj.

Plej ofte uzataj estas la tri ĉefaj guŝospecoj:

Fazeolo (*Phaseolus*)



Pizo (*Pisum*)



Fabo (*Vicia faba*)



\* PS:

Ĝus antaŭ ni finredaktis ĉi tiun numeron, venis tre interesa letero el Francio kun la rimarko ke "... *FAO uzas (la nomon de) guŝsemoj, sed tio estas fruktoj de ĉiuj leguminacoj.*" Jes, oni anoncis la "Jaron de guŝoj" kiuj fakte estas la manĝeblaj plantopartoj, kolektitaj post rikoltado de la guŝaj plantoj (legumoj). Konfirmas tion la Plena E-Vortaro:

**Guŝo** = longforma unuĉambra, duparta granujo de la (botanika familio) *fabacoj*. Sekve, oni foje nomas guŝojn ankaŭ seklegumoj. Por tion klare distingi, eble pli taŭgas la vorto "guŝplantoj".

Guŝplantoj apartenas al familio de fabacoj (sciencia nomo: *Fabaceae*), en botanika ordo de fabaloj (*Fabales*). Fabacoj estas la tria plej granda plant-familio en la mondo kaj konsistas el ĉ. 18,000 specioj. Ili riĉas je proteinoj, amelo, dieta fibro, karbonhidratoj, foliata acido, tiamino (vitamino B-1), mangano, kalio, fero kaj multaj mikroelementoj. Pro tia avantaĝo, guŝoj en multaj landoj estas preferata fonto de biologia energio. Laŭ manĝaĵ-industria produktado, oni povas dividi guŝojn je du kategorioj:

1. tiuj preparataj en kuirejo al homoj
2. furaĝo por bestoj.

**1a.** Por homoj, guŝoj kiuj kreskas en **moderaj** klimatoj:

Esperante	Sciencia ( <i>Latina</i> ) nomo	En via gepatra lingvo	Angle
Fazeolo ordinara	<i>Phaselous vulgaris</i>		Common bean
Ĝardena pizo	<i>Pisum sativum</i>		Garden pea
Fabo	<i>Vicia faba</i>		Broad bean
Kikero	<i>Cicer arientum</i> L.		Chickpea, Bengal gram
Lento	<i>Lens culinaris</i>		Lentil
Sojfabo	<i>Glicine max</i> L.		Soybean



Kikero / *Cicer arientum* L.




Lento / *Lens culinaris*



Sojfabo / *Glicine max* L.



Ternukso / *Arachis hypogaea* L.



Pizo de Angolo  
or: Kolomba pizo (?)  
/ *Cajanus cajan*



*Cajanus cajan*

**1b.** Por homoj, guŝoj de **tropika** (ankaŭ de arida, seka) klimato:

Esperante	Sciencia ( <i>Latina</i> ) nomo	En via gepatra lingvo	Angle
Azuki-fabo	<i>Vigna angularis</i>		Adzuki bean
Tepari-fazeolo	<i>Phaseolus acutifolius</i>		Tepary bean
Ternukso	<i>Arachis hypogaea</i> L.		Peanut, groundnut
Fazeolo de Lima	<i>Phaseolus lunatus</i>		Butter bean, Lima bean
Kolomba pizo, (aŭ: Pizo de Angolo-?)	<i>Cajanus cajan</i>		Pigeon pea

Fotoj sube:

## Kvar lupin-specioj (planto + semoj)



*L. albus*

*L. angustifolius*

*L. luteus*

*L. mutabilis*

## 2. Furaĝo (guŝplantoj uzataj al nutrado de bestoj):

Esperante	Scienca ( <i>Latina</i> ) nomo	En via gepatra lingvo	Angle
Blua lupeno	<i>Lupinus angustifolius</i> L.		Blue lupine
Eŭropa (flava) lupeno	<i>Lupinus luteus</i> L.		European yellow lupine
Fabo	<i>Vicia faba</i> L.		Field bean
Vintra vicio ?	<i>Vicia villosa</i> Roth.		Winter vetch
Hungara vicio	<i>Vicia pannonica</i>		Hungarian vetch
Seradelo (bird-pieda?)	<i>Ornitopus</i>		The Bird's-feet



*Vicia villosa*



Hungara vicio / *Vicia pannonica*



Seradelo / *Ornitopus*

Arkitekturon de malgrandaj konstruaĵoj vi povas realigi kiel hobbio, por aranĝi tian lokon en kiu vi ŝatas labori, resti aŭ orgaznizi renkontiĝojn. Tio povas esti malgranda kabano malantaŭ la domo, sport-angulo, benko aŭ alia ĝarden-meblo uzota sur herbotapiĝo. Tial, en kelkaj landoj, oni nomas tiujn objektojn simple “ĝardena arkitekturo”. Kompreneble, malpli grandajn meblojn vi povas instali ankaŭ sur teraŭo aŭ eĉ surbalkone.

Malgranda arkitekturo:

## Pavilono

Sed hodiaŭ ni prezentas al vi unu el plej popularaj objektoj de malgranda arkitekturo: pavilono. Tiu facile konstruebla objekto tre utilas en diversaj veterkondiĉoj; ĝi protektas kontraŭ pluvo, neĝo ktp. Dum varmegaj tagoj pavilono donas al vi ombbron dum forta sunbrilado. Ĝi ankaŭ ebligas ĝui brizon ĉar havas neniun muron, nur la tegmenton. Sube ni montras kelkajn modelojn de tiu arkitekturaĵo.



Simpla pavilono sur herbotapiŝo



Pli granda sed facila strukturo kun solida kahel-planko

En tiuj tagoj, kiam vi neniun gastigas, sub la pavilona tegmento oni povas instali ŝnurojn por sekigi lavitajn vestojn. Ili povas resti tie pli longan tempon senriske pri denova malsekiĝo, kiam subite ekpluvos. Alia avantaĝo: la vestoj tie protektitaj de intensaj sunradioj certe ne paliĝos. Pavilono, laŭ difino de PIV (Plena Ilustrita Vortaro) estas “Izola konstruo en korto aŭ ĝardeno”. Ni aldonu, ke tio estas kutime malpeza objekto kies prototipo estis 19-jarcentaj laŭboj. En la Oriento, ili estis konataj kiel “gazebo” kiun oni trovis en la ĉina, persa kaj en aliaj civilizoj.



Altana ŝirmejo por turistoj



Gazebo en japana parko



Plankon oni kutime faras el sama materialo kiel la tegmenton (ligno). Maldekstre videblas tia pavilono, iom pli longa por grandaj renkontiĝoj.

Se la ĉirkaŭaĵo estas malfermita, oni povas aldoni unu muron por halti troan ventoblovon. Foje, lige kun tia konstruaĵo oni faras ankaŭ deponejon por vestaĵoj, krad-rostejo, sporta ekipaĵo (ekzemple bicikloj aŭ – ĉe la bordo – kajakoj) ktp.